7-a JARO, N-o 343



LEIPZIG, 30. / 4. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

OKAZE DE LA UNUA DE MAJO

La Unua de Majo, ne nur tago por laŭtigi la depostulojn de l' laboristaro, sed ankaŭ tago de medito k bilancofaro, estas okazo por memori pri la grandaj celoj de l' socialismo. Tio en niaj tagoj estas tiom pli necesa, ke kvankam estas skizitaj k elmontritaj kiel alcelindaj en la programoj de la diversaj klasbatalaj proletaj partioj k parencaj organizoj tiuj grandaj celoj, en la praktiko pli k pli forviŝiĝas ilia pura belimaga bildo sub la pugnobatoj de l' realo: Pli k pli disfendiĝanta proletaro, intertendenca batalo. Klaskonsciaj sin nomantaj laboristoj interdisputegas, insultas sin reciproke per plej malhonorigaj esprimoj k estas ĝis tia grado okupitaj kontraŭbatali unu la alian, ke eĉ super tio ili forgesas la ekziston de ĝisdente armita malamiko, la vera kontraŭulo, al kiu plene utilas la spektaklo de tiu ĉi fratbatalo.

Kiu kulpas pri tiu stato? Ĉu nur la cirkonstancoj (vorto tro volonte uzata, ĉar diranta nenion k senkulpiganta ĉion!)? Ni diru prefere, ke la mal toleremo de l' homoj kulpas pri tio, la senskrupuleco de iuj agitistoj-gvidistoj k la blinda fanatiko de aliuj.

Kompreneble, oni povas klarigi al si la diversajn taktikojn k divers-tendencajn vidpunktojn; oni eble eĉ povas per dialektika metodo pruvi la historian neceson de tiu procezo; sed al neniu oni povos pruvi, ke en la nun akceptitaj pozicioj de l' partioj unu kontraŭ la alia estas ia ajn utilo por la tuta laborista afero, k ke sekve estas trafe pliprofundigi, se tio eblas ankoraŭ, la abismon inter proleto k proleto. Kaj estas malfacile, vidante tiun ĉi situacion, ne ĉagreniĝi k pripensi pri rimedoj por rekunigi kiel unuecan forton kontraŭ la minacanta faŝismo la disigitan laboristaron.

En senpartieca, kultura organizo, kia estas SAT, la principo pri intertendenca toleremo devus plej facile povi esti observata. Lasante al ĉiu ano laŭ sia individua deziro labori en diversaj lab. organizoj k partioj, SAT devus k povus esti modelo al ceteraj lab. organizoj laŭ unueco. Per sia tutmonda interligo la SAT-anoj povus akiri iel pli altan nivelon de super-rigardo al la aferoj laboristaj k rilati tolereme al anoj de aliaj tendencoj ol ilia propra.



Skulptis M. Kaliŝ

Oni devas starigi sin sur nivelon de persone malinteresitaj, senpasie pensantaj ide-batalantoj por akiri la ĝustan rilaton al la problemoj. Necesas la supera vido pliakrigita de iu scienculo-filozofo, kiel Ajnŝtajn (Einstein), kies vortoj antaŭnelonge eldiritaj en interparolo kun Sinkler, ŝajnas al mi meriti esti citataj en ĉi tiu loko.

"La kruela nuntempa krizo de l' mondmerkato" li diris, "estas, mia-opinie, la pozitiva pruvo, ke la nuntempa ekonomia organizado — laŭ la mezuro kiel oni povas paroli pri "organizado" nuntempe — ne plu estas konforma al la bezonoj de l' homaro. La konstato de tiu ĉi fakto devas esti utiligata malpli kiel okazo por fari kulpigan paroladon ol kiel motivo por klopodi reorganizi la ekonomian vivon tiele, ke la ekzistado de l' homaj estaĵoj ne plu estu minacata de la krizoj."

Ajnŝtajn kiel multaj aliaj, kiuj mem ne proprakorpe rekte sentas la sekvojn de l' krizo, ne povas ne konstati honeste la faktojn k tiri siajn konkludojn, kiuj kondamnas la kapitalistan organizadon.

La ĉi-jara Unua de Majo karakteriziĝas speciale per la granda ekonomia krizo k de ĝi rezultanta senlaboriĝo de milionoj da laboruloj en la kapitalistaj landoj. Ĉie malaltiĝis tie la vivnivelo de l' laboristoj, k anstataŭ la ĝoja festhumoro, la sento pri abundo, kian vekas en ni la printempa maja naturo, k kiun sopirus travivi en tiu ĉi tago la laborul-amasoj, estas mizero k subpremo ĉe la fundo de ilia animo.

Alvenis k forpasis jam multaj Unuamajaj tagoj; inter ili estis kelkaj tre imponaj, kiuj vidis grandiozajn manifestaciojn tra la tuta mondo por nia idealo. En multaj regionoj ili estis tre agititaj k eĉ sangmakulitaj, tie kie la burĝaro aŭ la faŝismo metis aktivan kontraŭstaron al ĉia provo de manifestacio. En Sovetio ĝi estas festotago plena de pompo k ĝojo, kun ruĝarmeaj paradoj.

Klasbatalo restas la devizo de ĉi tiu

tago; en ĝi kuŝas la solvo por la sociaj problemoj. Sed la klasbatalo povas esti sukcesplena nur, se la granda plimulto de l' Proletaro decidiĝas kune batali en komuna fronto. La hodiaŭa stato ne donas la necesajn premisojn; ĝi ne estas kuraĝiga. Ĉu tial ni malesperu pri la morgaŭo? Ne! certe ne! Jam aŭroras nova epoko, en oriento lumradias: la telegrafoj anoncas pri konstruado seninterrompa k persistega en la lando de l' Sovetoj. La memfido de l' laborista klaso ne estas rompita, k tiun memfidon ĝi manifestos ankaŭ ĉi-jare en la tago de l' Unua de Majo. Ĝi rean fojon montros al la reganta klaso, ke ĝi estas decidita batali por siaj viv-interesoj ĝis la celo, ĝis la liberiĝo el katenoj, ĝis starigo de justa sociordo sur la tuta terglobo! *N. B.*

MAJO

Ĥ. M. Ĥrima.

Ni ĉiutage sub la batoj de Laboro ĝemas.
Mizero k malsat' nin premas. En malvarm' ni tremas.
Kaj tamen — unufoje dum la jaro
kun radianta gaj'
aperas sur florornamita ĉaro
L' unua tag' de Maj'!

En tiu ĉi unika tago tra la tuta tero
laboro haltas k forgesas ni pri la sufero.
Disfluas sur la stratoj flugfolioj
vokantaj sen ekĉes'
proletojn kunfandiĝi je longstrioj
por forton montri, jes!

Fabrikoj ŝajnas jen venkitaj en batal' gigantoj.
Senpovon sian ili sentas sen la laborantoj.
Kaj en palacoj mastroj manojn frotas,
insultas kun grimac'.
Dum el kazernoj kavalkad' ektrotas . . .
Ekgutas sang', tra l' plac' . . .

Sed malgraŭ feraj kugloj, sabroj sangverŝantaj, skurĝoj —
minacaj pli estiĝas ni al la porkgrasaj burĝoj,
k niaj ŝtalaj porbatalaj koroj
ribele brulas, kaj
tra tuta tero tondras ni en ĥoro:
"Sed tamen — vivos Maj'! . . ."

Rezignu vian potencon!

F. S. (16462)

Kapitalistoj ofte plendas, ke ili ne plu povas tiri sufiĉan gajnon el la produktado, ke ili eĉ malprofitas, ke entute la eksplutado ne plu estas plezuro. Ili mem devas konfesi, ke la privata mastrumado krizadas, sed ili serĉas la kulpon ne en sia malkapablo, sed en la postulemo de laboristoj.

Certe la vekiĝo de laboristaj amasoj al klasa konscio jam iom malfaciligas la senbaran regadon de l' kapitalo k eĉ kelkloke sukcesas ŝanceli ĝian pozicion, tiel ke diversaj sociaj demandoj en la kapitalisma sistemo ne plu estas solveblaj. La fino de l' kapitalisma socio alproksimiĝas k pri tio lamentas k ploras tiuj, kies historia sorto nun ekplenumiĝas.

Oni povus kompati tiujn malfeliĉulojn, kiuj ĝemas sub la premo de siaj posedaĵoj, kiuj tiom penadas por la bonfarto de l' homaro k rikoltas nur maldankon. Estos baldaŭ tempo, ke ni fine savu tiujn viktimojn el ilia malagrabla situacio. Ni emu liberigi ilin k alvoku:

Kapitalistoj, se vi suferas pro la nunaj neelteneblaj cirkonstancoj, ni scias por vi rapidan kuracon. Rezignu nur je via potenco, — kiu kaŭzas al vi zorgegojn k al la sklavoj mizeron —, k transdonu ĝin en la manojn de l' popolo! Miloj da freŝaj fortoj staras pretaj, depreni la pezajn ŝarĝojn de viaj ŝultroj k prospere plenumi tion, pri kio vi ĉiam malsukcesis k neniam sukcesos, nome planti homaran feliĉon sur la teron. Dekmiloj, centmiloj, milionoj da cerboj febras, okupi viajn postenojn por la beno de l' tutmondanaro. Viajn malhelpaĵojn ni ludfacile forigos. Rezignu do, rezignu . . .

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esp.-devenaj!

LA TROMPO PRI RASA SUPERECO

Ekzistas mensogoj, kiuj ŝajnas veroj, ekzistas trompoj, kiuj estas popularaj k enradikiĝas en la popola konscienco k poste transformiĝas en aksiomajn verojn, kiuj montras la vojon al gentoj dum difinitaj epokoj en iuj situacioj. Inter la nordaj gentoj ekzemple estas tre populara la ideo pri ilia rasa supereco. Oni akceptas kiel nekontesteblan fakton, ke unu raso pro naturaj kaŭzoj superas al ceteraj. Do, ni esploru. Supera raso, laŭ tiu ĉi procedo, estas la kaŭkaza, k speciale ties norda branĉo. Sed jen, antropologo, profesoro ĉe la Ĉikago-a universitato, s-o F. Kuperkel (Coopercale), kiu estas aŭtoritata scienculo, konata tra la tuta mondo, neniigas la faman teorion pri daŭra supereco de homa raso laŭ ties pradeveno.

Ni vidas unu rason deklaranta sin supera al la ceteraj; sed estas malfacila afero por ĝi pravigi sian deklaron. Ĉar (laŭ profesoro Kuperkel) la homa Historio montras al ni unu longan procezon pri evoluo de grandaj gentoj, kiuj siatempe ĉiuj kredis sin superaj al ceteraj rasoj. Ekzemple, tiel estis 2500 jarojn antaŭ Kristo, Egiptio posedis la unuan genton laŭ civilizo. Ĝi estis la plej distinga pri arto k industrio. Se oni demandus en tiu tempo al la faraono, ĉu ekzistas supera raso, li tuj estus respondinta, ke certe tia estas la egipta. Sed jen, dum la sama epoko, dum kiu Egiptio estis la unua laŭ civilizo, Mezmara popolo disvolvis en Kreto civilizon sufiĉe altan por anstataŭi la egiptan koloson. En la 15. jarcento antaŭ Kristo la Kreta kulturo jam superpasis la limojn de l' Nila regno. La Kretanoj tiam estus respondintaj same kiel la faraono.

Dum Kreto floris en arto k industrio, jen duonbarbara gento, la greka, direktita ĉefe laŭ la vojoj elirantaj de Trojo, alproksimiĝis al Makedonio. Neniu povus diri en tiama tempo, ke tiuj krudaj paŝtistoj, kiuj loĝis en la Balkana duoninsulo, superpasos la Kretanojn de l' Niniva epoko laŭ kultura k civiliza grado. Tamen ili tiel faris; ili venkis la Kretanojn, alproprigis al si ilian kulturon k edziĝis kun iliaj junulinoj. Tiel en la j. 500 antaŭ Kristo naskiĝis miksita gento, el kiu poste fariĝis la klasika Grekio. En tiu epoko la grekoj estis supera gento — regantoj super la Egea maro.

Tamen, la evoluo daŭras. La grekoj estis venkataj de alia barbara gento, la romanoj, ĉe alveno de la kristana tempo. Romo estris la tutan mondon. La Romaj civitanoj estis supera gento, ĉu ne? Ili vidis kun granda malamo al la sovaĝaj gentoj, kiuj loĝis en la arbaroj de Gallio k Germanio. Oni demandu al Cezaro k Cicero por havi ilian opinion pri tiuj gentoj, kiuj loĝis apud la Danubo k la Rejno. La adjektivo "barbara" aperos en la respondo.

Sed kio sinsekve okazis? De ĉiuj estas konata la historio de la unuaj kvin jarcentoj de nia tempo. La nordaj barbaroj atakegis la imperian teritorion k neniigis ĝiajn belegajn kamparojn. Legio post legio envenis k fine ili detronigis Aŭgustulon, la lastan

de la Cezaroj. Tiuj barbaroj el la nordo transformiĝis en la nunajn civilizitajn *naciojn*. Nacioj, ĉu ne? — Tiel resumante finis profesoro Kuperkel. Tial ke unu raso superregas la situacion en la tuta mondo aŭ en parto dum pli malpli longa tempoperiodo, oni ne rajtas konkludi el tio pri daŭra supereco. Ni povas juĝi laŭ la pasado de l' Historio. Eble gento sin levos k anstataŭos la nunajn superregantojn. Krom la Historio, ankaŭ la arkeologio instruas al ni, kiel la civilizo moviĝas de loko al loko, transiras de tiu gento al alia. Kvankam multaj rasoj evolue malantaŭas nuntempe, ĝuste ili eble morgaŭ formos la antaŭgvardion de la civilizo. *Tradukis el la Varela Gazeto (Usono) SAT-ano 13 614.*

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Batalo kontraŭ la abortiga paragrafo en Germanio

En Stutgarto estis enkarcerigitaj antaŭ la kristnaskaj "festotagoj" la fama proleta poeto k kuracisto K-do d-o Fr. Volf (Wolf) k la kuracistino d-o Kinle (Kienle), ĉar ili malatentis la par. 218 de l' germana punkodo, kiu interalie malpermesas la abortigon de virinoj. Volf k Kinle helpis interrompante la gravediĝon ĉe virinoj, kiuj pro sociaj kaŭzoj ne povas nutri pliajn infanojn. La policistaraj traktadoj estas la sekvo de nuntempe en Germanio komenciĝanta akra kulturreakcio. Okazis protestkunvenoj multnombraj, kiuj estis tre bone vizitataj. Kelkfoje devis esti rapide instalataj paralelkunvenoj en kelkaj urboj; ekz. en Stutgarto, kie loĝas la enkarcerigitaj — eĉ kvin. La salonegoj estis ĉiam plenplenaj, k ne ĉiuj, kiuj aĉetis enirkartojn, povis esti enlasitaj. Partoprenis homoj sen diferenco de partipolitika tendenco. Kompreneble la faŝistoj k eklezianoj kondamnas la protestojn. Spontanee formita defendkomisiono sukcesis unue liberigi K-don Volf. Publike li deklaris, ke en batalo kontraŭ la par. 218 ne temas pri lia persono, sed pri *la afero mem*. En Germanio ja mortas pro la fiparagrafo dum ĉiu jaro dekmiloj da virinoj. Volf estas membro de l' kom. partio. Post unusemajna malsatstriko la prokuroro devis liberigi ankaŭ la kuracistinon Kinle. La juĝistaro momente preparas sin por grandstila proceso. Centoj da edzinoj k knabinoj ŝajnas enplektitaj. Kolego-kuracisto de l' enkarcerigitoj Volf k Kinle denuncis ilin. La kom. partio planas postuli plebisciton (popoldecidon) celante forigi la paragrafon 218 el la germana punkodo. *Ulo (11 067).*

Redukto de la labortempo en fabrikoj (Germanio)

El diversaj germaniaj urboj oni anoncas, ke fabrikoj aŭ aliaj entreprenoj enkondukas la 40- aŭ 44-horan laborsemajnon. Per tiu procedo novaj laboristoj en sufiĉe atentinda proporcio povas esti okupataj. Sed la mallongigo de l' labortempo signifas salajran redukton samtempan (ekzemple en Bilefelda lavofabriko de 15—18%) por la ĝis nun dungitaj laboristoj. Kompreneble tiel la entreprenistoj neniel malprofitas en la afero, k nur la laboristoj cedis, kiuj por mildigi la malesperan sorton de siaj kolegoj kondamnitaj al senlaboreco, montris solidaron akceptante kun la reduktita labortempo reduktitan salajron. *D. J.*

El Latvio

Skeme oni povas diri pri Latvio: La regno konsistas el tri partoj — Kurzeme, Vidzeme k Latgale. En la du unuaj la terkulturistoj havas relative grandajn posedojn: po 100—200 hektaroj. Kontraŭe, en Latgalio oni

Kiel pasis la Unuamaja Tago en Kievo (Ukrainio)[1]

Hodiaŭ, tra ŝtonaj stratoj sulkoj, fantazie interplektiĝante, glitante unu kontraŭ la alia, fluas homaj torentoj... Stalinka, Oktjabrka, Janvarka, Leninka — regionoj de Kiev...

Kaj la *Internacio* — — triumfu en tutmond'! — aŭdiĝas en milvoĉa bruado, milpieda frapo k piedŝovado. Kiel multkolora fantazia arbaro flirtas standardoj, afiŝoj, devizoj, flagoj...

Kupra bruado de orkestroj ne ĉesas eĉ por unu minuto. Marŝas metalistoj. Marŝas transportistoj. Ledistoj. Nutraĵistoj. Kleriglaborantoj. Presistoj.

— Gek-doj! Vivu Unua de Majo — batala parado de revoluciaj fortoj de l' tutmonda Proletaro. Hura!

— Hur—ra!...

Ŝancelas la stratojn giganta marŝado; oni piedfrapas la pavimon en takto kun furioza kriego de l' orkestroj. Tara — tara — tam-tam, tara — tara — tam-tam-tam...

Enkojniĝas en festa bruado pioniraj tamburoj. — Trans la maroj, maroj, maroj, — jen ĉi tie, morgaŭ — tie... — kantas junpioniroj.

Jen spirblovante afereme, gratante per ŝtalaj radoj la ŝtonan bruston de l' pavimo, — movas sin unu post la alia traktoroj... "Zaporoĵe"-oj, "Raŭpaj", "Fordzonoj". Ili tiras post si



Domo de Trustoj en Kievo (Rekonstruita post la Revolucio)

plugilojn... Atendaspekte pendas iliaj brilantaj partoj. Kaj jen giganta blanka bobeno — simbolo de l' kabla fabriko. Renkonte al ĝi rampas kirasaŭtomobiloj, tankoj, kelkmetraj ŝuoj, pontaj partoj, fervojaj vagonoj, arbosegejoj, tipograf-stabloj...

Konstruo de l' Distrikta Plenumkomitato. De sur larĝa balkono krias juna blankdenta laboristo:

— Nia respondo al imperiismaj kaŭzantoj de l' milito — la Kvinjarplanon dum kvar jaroj! Pli multe da traktoroj al la kamparo... Vivu la Unu-u-a... Hu—r—a—a...

Ĉirkaŭe, kien ajn vi rigardu, — multkolora, ondiĝanta, bolanta maro da kapoj. Kaptukoj, ĉapoj, ĉapeloj, kepoj, kaskoj, senharaĵoj, hartufoj, ĉapetoj... Kiel senfina torento fluas la manifestaciantoj.

Jen, en ordaj vicoj preterpaŝas korpkulturuloj. Junaj belstaturaj knaboj. Knabinoj en multkoloraj majaj kostumoj. Oni kantas. Trapasas piedpilkistoj. Malpez-atletoj. Gimnastikuloj. Sportuloj — akvolaboristoj.

Precize, kiel laŭ fadeno, rado ĉe rado, traveturas biciklistoj. Post ili marŝas ĉasistoj, plenuniforme kun ĉashundoj.

Jen aŭtomobilo de eksterlanda laborista delegitaro. "Vivu Unua de Majo!" krias homoj en grandaj okulvitroj, starantaj plenkreske en aŭtomobiloj.

— Hu—r—ra—a! — ĝoje bruas unuanima respondo. Sed kio ĝi estas? Pli laŭte sonas la muziko. Belsonaj fanfaroj ludas solenan renkontkanton.

[1] Tiun ĉi skizeton mi disaŭdigis esp-lingve el la Kieva sendstacio la 1-an de majo 1930 vespere. — *D. V—Ĉ.*

posedas po 2, 3, 6 aŭ 10 hektaroj. En Kurzeme k Vidzeme estas malgrandaj familioj, en Latgalio po 8 ĝis 10 personoj formas familion, kiuj devas vivi per 4—6 hektaroj da grundo. Rezulte multaj latgalianoj laboras kiel servistoj ĉe riĉaj terposedantoj. Latgalio estas katolika, la ceteraj partoj de Latvio protestantaj. La pastraro havas ankoraŭ grandan influon sur la vivon de l' malklera latgaliano. En la urboj la lab. afero estas en manoj de socialdemokratoj, kiuj ricevis en antaŭ-nelonge okazintaj elektoj al Riga-a urbkonsilantaro 29 anojn (la tuta nombro estas 100), la komunistoj — 11. Aŭtune estos elektata la latva "sejmo" (parlamento). La riĉuloj de Kurzeme k Vidzeme zorgos pri si; la malriĉa Latgalio dispeciĝos je eroj: komunistoj, socialdemokratoj, burĝoj k klerikaluloj. Ĉar la servisto ĉe la kampara riĉulo havas hundan dankemon, allogas la malgrand-posedantojn la fetiĉo pri posedo, k ili kredas la pastrajn predikojn, ke "socialistoj estas sendiaj inferuloj". Almenaŭ ĝis nun ankoraŭ pravas (oni komprenu, sed ne malesperu!) la vortoj de l' latva poeto Vejdenbaŭms, kiujn li skribis antaŭ proksimume 40 jaroj:

"Simplaj hometoj
En sklavec' sin turmentas . . ." ktp.

M. B. (17 254).

KIAL SENLABORECO?

La problemo pri senlaboreco ŝajnas esti unu el tiuj, pri kiuj plej diverse estas opiniata, laŭ tio kiel oni rigardas la ekonomion k la kapitalismon. Konsiderante la diversajn respondojn al mia artikolo, mi sentas min devigata ankoraŭfoje preni la plumon por provi refuti la diversajn malĝustaĵojn k plidetaligi mian teorion, kiel K-do 16 356 deziras.

K-do Soares respondis mian artikolan surskribon per "Tial ke la milito grumblas", k mi devas demandi "kial la milito grumblas?". La respondo estas: "Tial ke la krizo ekzistas". Ĉu el tiu lia respondo pri la kriza próblemo ne tuj klariĝas, ke ĝi ne povas esti ĝusta? Mi klarigis en antaŭ artikolo mian opinion pri la krizo k ripete diras ĉi tie mian aserton, ke la solvo de l' *mona* problemo estas la solvo de l' kriza problemo. Militoj k ribeloj nur tial estiĝas, ĉar la kapitalisma krizo regas.

Li nun krome diras, ke ni ne perdu tempon k energion por pritrakti teoriojn, sed venu al la praktiko. Bone! Sed ĉu tio estas la sola praktika solvo, akcepti la komunisman politikon? (Eble!) Ĉu oni ne unue devas klarigi teorion k poste veni al praktiko? Ĉu mi ne klarigis sufiĉe la praktikan solvon rilate al la monproblemo? Kompreneble ni povas nur atingi tion per politika batalo (rekta agado, sed ne parlamento!). Tiurilate mi devas eldiri, ke oni jam paŝas al praktikigo de l' de mi akceptita teorio, precipe en Germanio, Svisio k Aŭstrio. La tielnomata "Fiziokrata batalligo[1]" eldonas tie apartan varŝanĝilon ("monon"), kiu jam cirkulas en la nomitaj landoj, kiu ignoras la oran monon, kiu havas la perdiĝantan valoron kiel la varoj k tial pli rapide cirkulas, kies sekvo estas pli multa k ofta demandado pri varoj.

En unu karbminejo en Sudgermanio la laboristoj jam estas dutrione salajrataj per tia "mono". (Ni ne rajtas diri "mono", ĉar la leĝo malpermesas tion; ni rajtas paroli nur pri "kreditbileto"). En tre multaj urboj multaj varvendistoj akceptas tiujn biletojn same kiel monbiletojn ŝtate agnoskitajn. La polico kompreneble jam provis malpermesi tiun varŝanĝilon, sed ĉar ja ne estas mono, sed nur kreditbiletoj, ĝi ne povis. Se tamen oni nun malpermesus tiujn biletojn, tiam certe pli multaj laboristoj estus atentigataj pri ĝi k ĝia endanĝerigo al la ŝtato; aŭ — se tiam la tuta laboristaro jam

[1] Pli bone dirite: aparta tielnomata "Varŝanĝ-asocio".

Alproksimiĝas novaj kolonoj. Specialaj kolonoj. Belformaj batalionoj. Skadro post skadro, roto post roto preterpasas, militigita laborista junularo.

Kun bruego k grincado rampas artileriaj baterioj. Antaŭ la tribunoj preterpasas junkomunistaj eskadronoj. Post ili — sanitaristaj taĉmentoj. Jen knabinoj en verdaj ĉapetoj, en blankaj tuketoj . . . Ili portas kun si portilojn k apotekajn kestojn.

— Vivu militigita junkomunistaro, — triumfe bruas la tribunoj. — Hur—ra! . . . Jen denove tramarŝas fabrikaj laboristaroj.

Ĉiu devizo sur afiŝego triumfe kriegas: "La maŝinigo estas rekta vojo al socialismo. Vivu socialisma raciigo!"

Super la urbo flugas belformaj ŝtalaj birdoj. De sur la aeroplanoj falas flugfolietoj. Trapasas lernejanoj, pioniraj taĉmentoj. La infanaro en plaĉaj sportĉemizoj bele tramarŝas la placon. Gaje krias la Oktobridoj[1] el aŭtomobiloj.

Mirinda knara muziko allogas multajn al la mezo de l' strato. Gravaspekte elpaŝas brunaj, diverskolore vestitaj muzikistoj, asirianoj. Furioze ĝemboj-as ilia instrumento "zurna". Bruegas tamburoj. Akresone fajfas blovtubetoj. Ĝi estas marŝparado de l' orientaj popoloj. Sub baldakeno marŝas ĉinoj, kartveloj, ĉerkesoj, turkoj, armenoj — ĉiuj en novaj kostumoj. Kaj sub ĉi tiu muziko, meze de l' pavimo, dancas *oseto*[1] en blanka vesto. Li nenion vidas ĉirkaŭ si. Li facile sin portas en mirinda danco, transĵetante el mano al mano elingigitan sabron.

— Vaĥ, vaĥ! — krias la oseto, kaptita de senlima gajo. Kaj multmila amaso, ekscitita per ĉi tiu senbrida ĝojo de la brunhaŭta kaŭkazano, supersonas per sia ekstaza bruo la salutalvokojn de K-doj, starantaj sur la tribuno.

Jen vangosta, flavavanga ĉino alproksimiĝas al la dancanto k ion krias. Flirtas devizoj super la marŝantaj orientanoj. "Vivu laborist-kamparana revolucio en la kolonioj. Vivu tutmonda Proletaro!" "Ĉiu nova sukceso de Sovetio — estas frapo por la internacia burĝaro. Vivu Sovetio — la patrio de l' internacia Proletaro!" Jen fortika, grizokula vilaĝanino en blanka eluzita kitelo. Fiere ŝi portas imponan orbroditan standardon de siaj ĉefoj. Al avangardaj kolĥozlaboruloj — terkulturistoj konstruantaj socialisman mastrumon en kamparo.

— Unuamaja saluto de laboristoj k laboristinoj! Hur-r-a!

— Hu-r-a-a! unuanime respondas la delegitoj-kolĥozlaboristoj, en akorda kolono marŝantaj dense malantaŭ la laboristoj. Kun bravaj kantoj pretermarŝas la militistaro. Marŝas superlernejaj gestudentoj. Lernejanoj . . .

— Allo, allo, parolas Tifliso.

— Allo, allo, parolas Moskvo.

Kriegas la laŭtparoliloj.

Tramarŝas centoj, miloj, dekmiloj da manifestaciantoj. Tio ne estas manifestacio, ĝi estas solena procesio! Ne, ĝi estas tra la stratoj dissternita, potenca festo ĉirkaŭkaptanta per *unu* triumfa sento la unuecan koron de l' laboruloj. Ĝi estas la Dektria Unuamajo. Nevidita grandega festo.

Oni povis vidi ĉe la standardoj, kiel honora gardistaro, postrestante malfacile, irantajn kurbiĝintajn maljunulinojn . . . ili estas laborveteraninoj. Oni povis vidi sur la placo inĝenierojn, fandistojn, panbakistojn dancantajn. Oni povis vidi fratajn ĉirkaŭprenojn de ruĝarmeanoj kun iliaj militestroj. Kaj tamburis, tamburadis etaj pioniroj, sidantaj sur la koloj de barbhavaj muskolfortaj laboristoj.

Tiel aspektis nia urbo Kievo en la internacia laborista festo — Unua de Majo 1930. *D. Viktorov-Ceĥoviĉ.*

[1] Pli junaj infanoj-zorgatoj.

[1] Ano de kaŭkaza gento.

akceptus tiun "monon", ĝi ege atakus la ŝtaton k eble minacus ĝin per bankroto. Ĉu tio ne estas praktiko?

K-do Knourek citas sur pĝ. 190 de "S-ulo" la plej diversajn batalilojn kontraŭ la senlaboreco k opinias, ke post plenumo de ĉiuj diritaj devizoj ni ne plu suferus pro senlaboreco. Sed parto el liaj proponoj ne estas necesa, k kelkajn de li proponitajn batalilojn mi tute ne povas konsenti, tial ke ili ne forigus la mizeron k ne vigligus la ekonomion. Ekz. li proponas la 4-horan labortagon; ĉi tiu devizo estas bona tiurilate, ke multaj homoj estus entirataj en la produktado, sed malbone estas, ke la salajroj de l' laboristoj tre malaltiĝus, ĉar la entreprenistoj ne povas pagi la saman salajron kiel por 8-hora labortago (ĉar la entreprenistoj ja devas pagi impostojn, *rentumon* por monpruntepreno k ne malaltigus sian propran salajron). Tial aŭ la produktado ĉesus, aŭ la mizero estus nur iom dispartigata. Plimallongigon de l' labortago mi aprobus nur, se la kapitalismo (rentum-donanta propraĵo) estus forigita.

Krome tiu K-do i. a. eraras dirante, ke la krizo estas artefarita de la tutmondaj entreprenistoj. Ne la entreprenistoj, sed la tutmondaj monposedantoj (kreditdonantoj — kapitalistoj) kulpas aŭ pli bone, la tuta nuna monsistemo kulpas pri la krizo, same kiel ĝi kulpis pri la inflacio. Kio nun regas en plej multaj landoj, tio estas deflacio (prez-malaltigo), k nur la deflacio kaŭzas la nefunkcion de la ekonomio, ĉar la monposedantoj (kapitalistoj) profitas, se ili ne tuj elspezas sian monon, sed atendas ĝis la prezoj ankoraŭ plimalaltiĝas; tiel estiĝas la stagno en la industrio.

Rigardu la inflaciojn k la deflaciojn, k vi trovos, ke en *tempoj de inflacioj* (prezaltiĝo) *la ekonomio vigliĝas, la senlaboreco foriĝas*[1], kiel lastatempe ankoraŭ okazis en Francio, kie estis eldonitaj pli da monbiletoj k okazis ioma inflacio; tie estis nur malmultaj senlaboruloj proporcie al aliaj landoj, kie regis la deflacio. La granda germana inflacio (1921—1923) k la nun iom reganta inflacio en Sovetio (kiu bedaŭrinde malgraŭ la progresoj en ekonomia rilato ankoraŭ suferas sub la *ora mono* k tial ĉiel de ĝi estas dependa) estas aliaj ekzemploj por mia opinio, ke en tempoj de deflacio la ekonomio stagnas, la senlaboreco estas kompreneblaĵo.

Ĉiu objektive rigardanta laboristo nepre devas vidi, ke la mono estas la ĉefkaŭzo de l' mizero k ke la registoj provas trompi la laboristaron tiel, ke ili neniam klarigas iom pri la rolo de l' mono. La laboristoj ne plu devas esti fanatikaj Marks- aŭ Kropotkin-anoj en la mona rilato k opinii, ĉar ĉi tiuj ignoris la monon aŭ eĉ opiniis forigi entute la monon en la socialisma sociordo, k ĉar ili tial ne trovis bonan monsistemon anstataŭan por la hodiaŭa kapitalismo, tial la laboristaro ne bezonus okupi sin pri mono. Ne, Gek-doj, vi devas funde studi la tutan ekonomion k ĉefe la monsistemojn nunan k novan, k vi certe trovos la necesajn batalilojn kontraŭ la krizo. *(6707)*

[1] La inflacio cetere ne estas dezirinda ankaŭ por la proletaro (kvankam ne ekzistas labormanko), ĉar ankaŭ tiam la proleto estas la plej suferanta (aŭ la nura) k la kapitalisto faras bonan negocon. Mi citas la inflacion kiel ekzemplon nur por montri, ke la ekonomio efektive estas ĉiel dependa de la mona aferaro; la deziro de l' proleto estas nek la inflacio, nek la deflacio, sed la daŭra firmstara valuto, k ĝin ni nur atingas per la de mi klarigita monsistemo.

AL NOVA MAJO

EMBA

Odoron violan alblovas la vento,
Sed vane ĝin blovas, ĝin vane portas . . .
Viola odoro, en morto-turmento,
En sanga aero, mizere mortas.

Printempa ventblovo — plorĝemo anima,
Odoro viola — la venĝ' hienas,
Aromo natura — sufero senlima,
Jen majo la nigra! — karceroj plenas.

Ĉu estas la nia do tiu ĉi majo?
Ne! . . . Majon la nian ornamas rave:
Ruĝantaj burĝonoj, libero k gajo,
Se ĉiuj ni luktos por tio brave.

Delonge jam nigras funebra malgajo
Kaj bolas amare la malkontentulo . . .
Nun venu libero, nun venu la Majo!
Ribelu konscio, ribelu sento!

Funkciu la cerboj k haltu la suno
Majestan miraklon ĝi gape miru.
Por ĉia maljusto nun venu la puno . . .
Al Majo la Nova amasoj iru!

Odoron violan alblovos la vento,
Ne vane ĝin blovos, ne vane portos;
Odoro viola, post longa turmento,
Pri Majo la Ruĝa al ni raportos.

Por nia medito

. . . Neniu, neniam, povas doni la ĝustan mezuron pri siaj bezonoj, nek pri siaj konceptoj, nek pri siaj doloroj k la homa parolo estas kvazaŭ fendita kaldrono, sur kiun ni tamburas ursdancigajn melodiojn, kiam oni volus kompatigi la stelojn.

Gustavo Flober (Flaubert).

Kiu estas la unua devo de l' homo? — Ĝi estas esti memstara.

Henriko Ibsen.

Se ci volas nek mortigi, nek mensogi, neniam ci sukcesos gvidi la homojn. *Eŭgeno Brieŭ* (Brieux).

TAGO EL MIA VIVO

Kiel juna knabo mi foje ricevis permeson sekvi kutron sur la maron por kapti haringojn per "ŝnurp"-retego. (Kutro estas unumasta ŝipeto el ligno kun ole-motoro k veloj). Ĉar estis bela senventa vetero, ni nur uzis la motoron k la kutro facile obeis al la korbatoj de l' maŝino k fendis la marsupraĵon por kiel eble plej baldaŭ atingi la celon. Sur la malantaŭa parto de l' kutro kuŝis preta la "ŝnurp"-retego k apude staris ses maristoj fumante k babilante antaŭ tre streĉa laboro.

Ĉe la direktilo mi sufiĉe fiera, postenis k apude la ĉefo k posedanto de l' kutro, kiu de tempo al tempo uzis sian lornon por esplori, ĉu mevoj ie kolektiĝis, bona signo, ke troviĝas haringoj.

Post trihora veturado ni ne plu vidis teron, eĉ la plej ekstremaj ŝeroj (rifinsuloj) malaperis. Ĉie en la horizonto nur la senĉese ondeganta maro k super ni kvazaŭ giganta kupolo la klara helblua ĉielo.

Malproksime ni vidis aliajn ŝipetojn levi sin sur ondodorso por baldaŭ malaperi en ondovalo. La mevoj, kiuj havis la saman celon kiel ni, kapti haringojn, flugis alte k dise. Subite maristo ekkriis: Baleno! k tuj ĉies atento estis direktita tien, kie la monstro elŝprucigis kiel fontano akvon k vaporon. La ĉefo prenis la direktilon k turnis la kutron tien, kie malaperis la baleno. Li samtempe donis ordonon al la ŝipanoj sin teni pretaj. La baleno reaperis pli proksime k kvazaŭ el la ĉielo venantaj kolektiĝis miloj da mevoj, kiuj faris surdigan bruadon.

De la ĉefo aŭdiĝis ordono post ordono, kiun la maristoj rapideme plenumis. La kutro haltis momenton k boateto estas ŝovita de la ferdeko sur maron. Du viroj postsaltis en ĝin kun ŝnuro de l' retego, k kvar viroj nun metis la retegon en la maron. Ekbatas denove la maŝino, k la kutro faras grandan cirklon. La supra rando de l' reto estas tenita flosanta sur la marnivelo per flosiloj. Baldaŭ la kutro atingas la boaton k la cirklo estas fermita. Nun oni per ŝnuro ligita al

E. IZGUR
NUR VOLU
La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo
Eldono dua, reviziita kaj ilustrita
Prezo: 0,70 mk. g.
Mendu ĉe Administracio de SAT
Leipzig O 27, Colmstr. 1.

TRA ESPERANTIO

KIU VOLAS HAVI RAJTOJN, TIU AKCEPTU DEVOJN

Supozeble, kiam homo decidas aniĝi al iu asocio, li nur faras tion post zorga pensado pri ties celoj k en plena konvinko, ke li tute konsentas al la principoj k regularo de la organizo. Tial estas subkomprenate, ke liaj kotizo k abono al la oficiala organo fluas en la kason de la administrejo, kiel natura afero. Teorie, jes; sed en la praktiko? Bedaŭrinde oni pli ofte spertas tute la malon.

Ni esploru la aferon ĉiuflanke: 1. Temas pri la subtenado al la organizo per la kotizoj pagendaj de la membraro, kiuj konsistigas la materian flankon, la spinon de la organizo, ties vivsangon kvazaŭe, sen kiuj ĝi ne povas funkcii; ju pli da mono estas enkasigata, des pli da laboro estas farebla, k per ĉi tiuj rimedoj ĝi povas daŭre influi sur ĉiam pli disvastiĝanta kampo.

Al ĉiaspeca organizo, ĉu politika, ĉu sindikata, ĉu religia, la supredritaj rimarkoj ja aplikiĝas senescepte. Ke la plimulto el la membroj, aŭ pro forgesemo aŭ pro malatento, ne rekotizas ĉiujare je la difinita tempo, tion pruvas la amaso da petskriboj, kiuj estas sendataj el la administra fako de diversaj organizoj: k ke ĉe la SAT-anaro implikiĝas k ĝenas la regulan antaŭeniron ioma kvanto da membroj, tio neniel estas helpa al ĝia kredito.

2. Pli grava estas la demando pri abono al la asocia organo. Ĉi tio estas afero de principo k devo, kiun volonte plenumas ĉiu lojala ano. Ĉiu organizo, por pravigi sian ekziston, nepre devas eldoni en tempo oportuna k difinita ĵurnalon, kiel perilon, per kiu la membraro konservas la kontakton unu kun la alia. Sur ĝiaj paĝoj troviĝas vera kroniko pri la agado en la asocio, sciigoj el ĉiuj urboj, kie troviĝas membroj, pri la movado tiea. Ĉe la SAT-anaro el la tuta mondo ankaŭ la individua membro rajtas esprimi tiom, kiom la loko permesas, sian vidpunkton pri temoj rilatantaj al administraj aferoj k similaj.

Tial ĉiu, kiu ne abonas sian asociorganon, ne rajtas sin nomi aktiva membro. Tre certe ne. Se li ne tiel multe interesiĝas pri asociaj aferoj, por sin informi pri aktualaj okazintaĵoj, do li estas nur *brakseĝa* ano, tute kontenta, ke aliaj toleru la plejforton de la batalo. Nur aktiva membro rajtas voĉdoni, ĉar kiel povas inteligente voĉdoni homo, kiu ne sciiĝas pri asociaj aferoj? Oni povas nur esti bone informita post legado de la ĵurnalo. Mi, kiu de jaroj estas aktiva SAT-ano, tute ne povas kompreni la sintenon de tiaj neabonantoj. Estas tute klare, ke sen ĉi tiu interkomprenilo (la gazeto) la influo k agado de l' organizo estas sendube limigitaj: ĝi fariĝas pigmeo anstataŭ disvolviĝi en sanan florantan kreskaĵon.

3. *Pri pagmaniero k rimedoj:* kompreneble estas konsentite, ke SAT ne konsistas el riĉuloj. Esence ĝi estas laborist-organizo. Ĉiu plej bone konas la amplekson de sia monujo, la monsumon disponeblan k la kotizpagojn farendajn al diversaj organizoj, kies membro li estas, krom la vivkostoj. Do ĉiu buĝetu laŭ siaj enspezoj.

La sperto montras, ke la plej ofte renkontita kontraŭstaro al la abono al "S-ulo", por ke oni estu aktiva membro, kuŝas en tio, ke la monsumo estas tro granda por ke laboristo pagu ĝin *per unu fojo.* Ĉe la plimulto el laboristoj certe tio ĝustas. Sed troviĝas diversaj pagmanieroj, el kiuj oni povas profiti k per tio transsalti la barilon. La administracio estas preta akcepti abonojn ĉiu-kvaron-jare sendatajn de la elektita peranto en loko, kie fondiĝis SAT-rondo(-grupo). La anoj povas ekzemple pagi difinitan monsumeton ĉiusemajne, pri kies enkasigo respondas la grupsekretario al la administracio. Aŭ la membro mem povas kolekti la kotizon laŭvole dum unu jaro k konservi por la venonta.

Ĉiuokaze, K-doj, escepte se malhelpas longa senlaboreco, ĉiu lojala, aktiva SAT-ano devas aboni nian organon. Grumbluloj k ĉikanaj kritikantoj ne troviĝu en niaj vicoj, por tiaj mankas loko. Ĉiu individua membro rajtas elekti sian propran pagmanieron post interrilato kun la administranto. Memoru, ke la ĉeno dependas de la plej malforta ĉenero; do, faru vian devon. Kie volo, tie povo. *Ofiro (2800).*

LA XI-a KONGRESO DE "F. E. O."

La XI-a Kongreso de la "Fédération *Espérantiste Ouvrière*" (*Esperantista* Laborista Federacio) por franclingvaj regionoj okazis dum pasko en la popoldomo de Nansi (Nancy). La jarkunveno de nia asocio prezentis nunjare specialan gravon. Antaŭ tri monatoj du "respondecaj membroj" de la SAT-opozicio en Francio, K-doj Salan (el Nim-Nîmes) k K-do Bubu (el Orlean-Orléans) klopodis je la nomo de siaj grupoj por starigi opozicion en FEO, kulpigante ties estraron pri forlaso de la klasbatalaj principoj, sur kiuj baziĝas nia asocio. Kompreneble neniun fakton ili citis por pravigi la akuzon!

Preskaŭ ĉiuj grupoj estis reprezentataj, ĉar ĉiuj estis trafitaj de la opoziciaj cirkuleroj k de niaj respondoj. Ankaŭ multaj izoluloj konigis per mandato sian opinion.

La oratoroj de la opozicio multe, tre multe paroladis, sed ne sukcesis pravigi sian aserton, ke la federacia estraro forlasis la klasbatalon. Kelkaj K-doj laŭvice montris per bonaj argumentoj k cito el tre signifaj dokumentoj, ke la nuna situacio rezultas el la instrukcioj de la estraro de la komfrakcio, ke ili kaptu la direkcion

---

maŝino "ŝnurpas", t. e. kuntiras la malsupran randon de l' retego, tiel ke ĝi fariĝas sakego k kaptita estas amaso da haringoj. Per alia retsaketo oni poste ĉerpas la arĝentbrilajn fiŝojn en la provizejon de l' kutro, kiu post duhora streĉa laboro fariĝas plenŝarĝita.

Preskaŭ duonparto de l' kaptaĵo estas liberigita, k kun granda penado oni trenis la retegon sur la ferdekon. Sekvas nun paŭzo kun kafotrinkado; la trinkaĵon mi intertempe preparis.

La marsupraĵo nun dum vespero estis krispa pro venteto. La veloj estas hisataj k la maŝino ekfunkcias, k baldaŭ la kutro fendante la ondojn direktas sin hejmen. Sed, ĝis ni atingis la havenon, sekvis nin aro da mevoj kriantaj en sia lingvo "Donu al ni haringojn!". Sed estas por satigi homojn destinita nia kaptaĵo, tial ni ne atentis la kriadon de l' birdoj.

Malfruvespere ni feliĉe atingis la havenon, kie atendis nin gelaboristoj por prepari la fiŝojn por la merkato.

Sed, kara leganto, ne kredu, ke estas ĉiam tiel facila la vivo de l' fiŝkaptisto. Tre ofte ili devas batali kontraŭ la furiozantaj elementoj perdante siajn fiŝkaptilojn, tre ofte eĉ la vivon. *Muri (102).*

ĈIU LEGU
la ĵus aperintan aprilan kajeron de
LA NOVA EPOKO
literatur-scienca revuo de SAT
El la enhavo: EMBA: Sur la vivo-montoj. — Panon aŭ revolveron. El hisp. lingvo de NELAK. — Bergiers: Simpla akcidento. — Primilita versaĵo el la skandin. literaturo. — *Faktoj k dokumentoj el la antaŭmilita laborist-esperantista movado.*
Unuopa n-o: 0,35 mk. g.
Abonu k abonigu al "La NE" ĉe
ADMINISTREJO DE SAT, LEIPZIG O 27.

en ĉiuj LEA-oj, por povi poste starigi *Internacion*, kiu kontraŭstarus al SAT. La nuna opozicio ja ne stariĝis spontanee, sed agas laŭ difinita plano.

En sia respondo la sekretario montris la malhonestan manovron de la gvidanto de Orleana grupo (K-do Bubu), kiu per cirkulero lastmomente sendita kulpigis la federacian estraron, ke en iu grupo ĝi subtenis la socialistojn kontraŭ la revoluciuloj k faris kontraŭstatutan decidon. Neniam estis socialistoj en tiu grupo (Turkŭen), kiu konsistas *nur* el membroj de la revoluciaj sindikatoj (CGTU)! Per tiu neveraĵo, la ĉefo de la opozicio celis kredigi, ke fakte la estraro — kies plejmulto da membroj apartenas al la revoluciaj sindikatoj — fariĝis malamiko de la revolucia tendenco, kiel estis senpruve skribite en "Komuna Deklaro de la Opoziciaj Grupoj".

Post du tagoj da teda diskutado, voĉdono okazis kun jena rezulto: 415 voĉoj aprobis la estraron, 238 malaprobis ĝin. Resume la nunjara kongreso faris neniun pozitivan laboron. Kulpas pri tio la K-doj, kiuj ne komprenas la signifon de la esp. movado k ŝovas en ĝin maltrafe partiajn demandojn.

Almenaŭ la kongresantoj havis la plezuron ĝui belan prezentadon de dancoj k kantoj aranĝitaj de germanaj K-doj naturamikoj, kiuj gaste ĉeestis en Nansi okaze de la Kongreso. La O. K. K., k tute speciale Gek-doj Dieŭdone, bone prizorgis ĉion k meritas sinceran gratulon pro sia laboro k sindono. La sekretario: *H. Kaŝon.*

VOĈOJ EL SOVETIO

"Al la redakcio de Sennaciulo.

"Karaj Gek-doj! Kun granda bedaŭro mi konstatas, ke en la lasta tempo SAT multe suferas pro interna batalo. Estas aperigita nova gazeto Internaciisto, kiun parto de tre 'revoluciemaj' SAT-anoj kontraŭstarigas al 'S-ulo'. En la nova gazeto oni multege skribas pri teruraĵoj okazantaj en SAT k en ĝia Direkcio. Oni alvokas la SAT-anaron bojkoti 'S-ulo'-n.

"Aparte vaste disvolviĝis tiu ĉi agado en Sovetio. La esperantistoj sovetaj ne havas la tutan materialon en siaj manoj, k ĉefe oni ne havas 'S-ulo'n. Sed pri 'S-ulo' ekzistas plej teruraj fabeloj. Nun mi, soveta esperantisto, scipovis trovi kelke da n-oj novaj de 'S-ulo' k devas diri, post tralego de l' gazeto, ke fabeloj estas fabeloj k plenaĝaj homoj ne plu kredas je la fabeloj, kiujn la opozicio rakontas pri nia malnova gazeto. 'S-ulo' estas vera gazeto de la esperantistaro proleta. Ĉiuj raportoj estas seriozaj, bonaj, objektivaj, ili bone lumigas la vivon laboristan k politikan. Mi ankoraŭ ne vidis pli bonan gazeton esperantistan por laboristoj, ol 'S-ulo'n. Se oni komparas 'S-ulo'n kun 'I-isto', oni certe nomos la lastan nur 'sonoretulo', ĉar en ĝi oni ne trovas ion alian krom fanfaronaj rezolucioj k insultemaj artikoloj.

"Vivu 'S-ulo'! k ĝi restu ankoraŭ longe la paroltubo de la proletaj esperantistoj. B."

"Kara redakcio! Se vi enpresos la leteron, ne enmetu mian nomon, sed nur la literon B. Vi komprenas kial mi petas pri tio. Mi restas konata al vi K-do B . . . ."

*

". . . Antaŭ nelonge mi ricevis protokolon el CK de SEU, kie oni promesas en Internacia Lingvo enpresi materialon pri la 'perfiduloj, kiuj subtenas duflankecan interligon kun Lanti'. Kredeble tio ĉi koncernas ankaŭ min.

"Antaŭ unu monato mi legis Internaciisto-n; aĉa ĵurnalo! Kiel mensogema ĝi estas! Kaj kiel malnoble, malbone faris M. Boubou. La artikolo estas verkita tre malsincere.

"Sennaciulo-n mi ne ricevas, kvankam Lerñner atestas pri ĝia regula elsendado. Fakte mi estas fortranĉita de SAT-movado . . . N."

K-doj, estu elpensemaj; ektrovu rimedojn por havigi "S-ulo"n al niaj Sovetiaj K-doj.

Dek kvin K-doj el naŭ landoj kolektis monon k pruntedonis ĝin senprocente al SAT kun la celo eldoni:

Vortoj de K-do E. Lanti

kun antaŭparolo de

L. Banmer

La verko ĵus aperis: ĝi estas 192-paĝa, dense presita k entenas jenajn ĉapitrojn: 1. Mondlingvo, 2. Organizado, 3. Edukado, 4. Sennaciismo, 5. Socipolitiko, 6. Pacismo, 7. Priskriboj, 8. Polemiko, 9. Pensoj.

La bele presita volumo kostas nur 12 fr. fr. (2 mk. germ., 2 ŝil., 0,50 dol., 2,50 svis. fk., 1,25 guld. hol.). Aĉetu, aĉetigu la libron: per tio vi ne nur havigos interesan k bonstilan legaĵon, sed vi plie helpos al SAT eviti la rifon, ebligante, ke ĝi pagu siajn ŝuldojn.

Sidejo de SAT: 23, rue Boyer, Paris XX.
Administrejo: Colmstr. 1, Leipzig O. 27.

Korektoj. — Pri "En okcidento nenio nova" en "S-ulo" n-o 340, pĝ. 223, 1. kol., 10. lin., legu: **sam**konscie anst. **sen**konscie, ĉar male tiu preseraro vundus senkulpajn homojn. (Soares.)

Sur la unua pĝ. de l' n-o 341 bv. korekti la piednotan indikon: *rupio* prezentas nur valoron de apenaŭ 2 ŝilingoj (½ dolaro), sed ne de 5 dolaroj!

En "Recenzejo" pĝ. 231, 2. kol., 14. lin. de malsupre) legu ĉe la adreso: *19 bis* (anst. lobis).

ESPERANTO K SOCIALISTAJ STUDENTOJ

Sukcesoj en Francio k Belgio

Oni memoras, ke la Nacia Kongreso de Socialistaj Studentoj, kunveninta en Strasburgo printempe de 1930, akceptis pri-espan rezolucion k decidis pli funde studi tiun mondlingvan demandon okaze de venonta kongreso.

Tiu Kongreso okazis en Tuluzo (Toulouse) de 5.—8. aprilo; iu esp-isto el la lastjara kongreso ankaŭ ĉeestis k eĉ estis raportanto pri la esp. demando: K-do Puarodo (Poiraudeau)!

Lia raporto enhavis i. a. jenajn sugestojn:

a) "La Kongreso de Soc. Studentoj disvastigu esp-on en vicoj socialist-studentaj per jenaj rimedoj:

a) Starigo de Esp. Komitato interne de l' Federacio Socialist-Studentara;

b) Dediĉo de 1 paĝo de l' monata revuo *"L'Etudiant Socialiste"* (Soc. Studento), al propagando k aplikado de esp-o;

c) Organizado de esp. kursoj interne de la soc. stud. grupoj. Por tion efektivigi, tiuj grupoj interrilatu kun la franclingva LEA k ties Socialista Frakcio.

Plie, la raporto dezir-esprimis, ke la Internacio de Soc. Studentoj publikigu bultenon en esp-o k agnosku post limigota tempo esp-on kiel oficialan lingvon; la raporto montras la dezirindon de vigla agado, por ke la Soc. Junularo ankaŭ propagandu k utiligu nian lingvon.

Tiu raporto estis entute akceptata unuvoĉe.

*

Pri la sukceso ĉe la revuo por socialistaj studentoj flandra-lingvaj *"Menschen"* (Homoj), aperanta en Gento (Belgio), ni raportis jam en n-o 341.

Gestudentoj ĉiulandaj, jen via devo:

La sukcesoj en Francio k Belgio havas ĉefan praktikan valoron: publikigi en la esp. paĝoj de l' fakrevuoj informojn pri VIA VIVO de soc. studentoj. — Tial ni bezonas vian kunlaboron! Nur tiel ni povos liveri viglan k instruan materialon.

Studentoj en malgrandaj lingvoregionoj, konsciiĝu pri la gravo de tiuj Paĝoj — de nun vi povas partopreni la vivon de viaj tutmondaj Gek-doj. Abonu do, se eble, tiun aŭ alian revuon.

Sendu viajn informojn por publikigo en *"Etudiant Socialiste"* k *"Menschen"* (originale aŭ tradukite), al sekr. de Socialista Frakcio de Franclingva LEA: F. Chamarre, 64, avenue de Metz, *La Rochelle* (Francio).

SAT-anoj!

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron

TRA LA MOVADO

KRONIKO

ĈEĤOSLOVAKIO. La 9-a ĝenerala jarkunveno de l' Lab. Ligo Esp-ista en Ĉeĥoslovakio okazis la 22. marto en Prago. Partoprenis delegitoj el 5 grupoj k Gek-doj el Aŭsig, Hradec Kral., Plzen, Prago. Salutojn sendis pluraj grupoj k sportsocietoj. Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj montriĝas kresko. Aliĝis dum la jaro 6 novaj grupoj. Estas eldonitaj 3000 nacilingvaj varbfolioj. Oni korespondis kun 21 lokoj enlandaj, 12 eksterlande, ricevis 147 leterojn, forsendis 83. Oni raportis k traktis pri kunlaboro kun Lab. Gimnasta Asocio por la 2-a Viena Olimpio k kondamnis la nefavoran sintenon de ties gvidantoj al esp-o. La "Bulteno" aperis regule monate. — *POLIO. Sosnoviec.* Okaze de morto de juna pacbatalanto, klaskonscia liberpensulo K-do E. Sosnovski, 30 Gek-doj k neŭtraluloj kondukis lin tombejon, kie K-do B. Ĉeĥovski adiaŭis esp-lingve. — *FRANCIO.* En vilaĝo Kievreŝen (Quièvrechain), kuŝanta en franca teritorio apud la belga limo, K-do Gerekens gvidas kurson por 15 skoltoj (gejunuloj) en la Skolta ejo. (15 973).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Infanmurdo. Biblioteko de Japana literaturo. Vol. 3. Jûsô Jamamoto. El la japana originalo trad. Joŝiŝi Ŝimomura. Esperanto-Kenkjû-Ŝa. Form. 12×16 cm; 47 pĝ. Prezo: 0,60 mk. g.

Ĉi tiu teatraĵo prezentas dramon kaŭzatan de la mizero. Ia malfeliĉa graveda kuliino, perdinte sian edzon, devas per sia sola laboro nutri sin, sian infanon k sian maljunan, invalidan patron. Naskinte sian duan idon k vidante, ke ŝi ne povas ĝin mamnutri, ŝi ĝin mortigas en granda doloro kvazaŭ pro kompato. La bonkora policano Kojama ŝin arestas k faras, malgraŭ ĉio, sian profesian devon kondukante ŝin al la ĉefoficejo.

La verko estas bone presita, la stilo korekta, la dialogo vigla k la temo interesa. *H. B.*

Epizodo en Ŝuzenĵi. Biblioteko de Japana literaturo. Vol. 4. Kido Okamoto. El la japana originalo trad. Ŝihej Mijake. Esperanto-Kenkjû-Ŝa. Form. 12×16 cm; 46 pĝ. Prezo: 0,60 mk. g.

Ĉi tiu epizodo prezentas dramon, kiu okazis en la 12-a jarcento. Tiam en Japanujo interbatalis du grandaj, potencaj familioj. La estro de unu el ili, Minamoto Joriie, estis mendinta sian maskobildon al la artisto Jaŝao, sed ĉi tiu ne volas ĝin liveri, pro tio ke la bildo ne kontentigas lin mem: efektive, la masko aspektas ne vivanta sed mortinta, k tio antaŭsignas malfeliĉon. Tamen la filino de l' artisto, Kacura, transdonas ĝin sekrete al la estro, kiu tre kontenta faras el ŝi sian favoratinon k fianĉinon. Fine la geamantoj mortiĝas ambaŭ en la batalo ĉe Ŝuzenĵi.

La preso k la stilo estas bonaj. La tradukinto uzas *malgraŭ* (pĝ. 11 k 22) en loko de *malgraŭ ke.* Pro la klaro oni devas diferencigi *malgraŭ, malgraŭe* k *malgraŭ ke*, same kiel *dum, dume* k *dum ke* (dum kiam); la unua estas prepozicio, la dua adverbo k la tria konjunkcio. Mi notis (pĝ. 30) jenan rimarkindan parolturnon: *ĝi ne estas loko por homoj vivi.* *H. B.*

B. Lavrenev, DISROMPO. Tradukis el rusa Helena Sazonova. 47 pĝ. Form. 14×20. Prezo: 0,80 mk. g. Eld. EKRELO, Leipzig. 1931.

Temas pri teatraĵo el la "heroeca periodo" de l' rusa revolucio, en kiu la bolŝevikoj preparis sian venkon. La plej multaj scenoj ludiĝas sur la krozŝipo "Aŭroro", kiu poste famiĝis per sia ago kontraŭ la Vintran Palacon en Petrogrado tiel kontribuante al la venko de l' revolucio. Preseraroj troas en la libro; sur pĝ. 6 troviĝas vortmonstro "ekscentrkonduta" (kiel prononci?); ĝenerale la lingvo estas korekta. *N. B.*

NIA POŜTO

2877. — Ni kvitancas ricevon de via manuskripto, kiu taŭgas por "LNE". *Red.*

1307. — Dann? Kompletan adr. ni bezonas. Monon ni sendis al Arvid. *Adm.*

Letervesperon

arangôs Esp. Klubo de Höganas la 16-an de majo ĉi-jare. Skribu multnombre! La morala devo certe estas plenumota. Adr.: K-do Harald Nilsson, Smedjegatan 3, *Höganas* (Svedio).

Esperantista Tendaro

13 km. de Nice. Vivo sub tendoj. Suno tutan jaron. Plena pensiono en tendo de 4 mk. g. Spec. prezo por karavanoj. Ekskursoj, nekare: Alpoj, Monte Carlo, Italio ktp. Skribu al: K-do Yelland, ASPREMONT apud Nice (Francio).

Intersteno

st e no

la kato (esp.) le jour (franc.) the town (angl.) die Tal (germ.) kyra (rus.)

Por ĉiuj lingvoj la samaj signoj

Koresponda skribo (fundamento) RM 1.—
Rapida skribo (supera ŝtupo) . . . RM 1.—
3 aldonoj por po 7 naciaj lingvoj po RM 1.—

Instituto de Intersteno

Friedenstr. 79, Duisburg (Germanio)

Haveblaj ankaŭ ĉe la
ADMINISTRACIO DE SAT
Colmstrato 1, LEIPZIG O 27.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Liberdade, Lisboa, 29. 3., sklaveco en 20 jarc. (333/334).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Le Règne de l'Homme, Bièvres, 15. 3., 1. 4.; *Les Primaires,* Issy-les-Moul, apr. (pri SAT); *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 11. 4.; *Signalen,* Stokholmo, 9. 4.; *Le Cri du Peuple,* Paris, 15. 4.; *L'Effort,* Lyon, 4. 4.

Okaze de sia 25-jara ekzisto la *Malmöa Esp. Klubo* eldonis 8-paĝan ilustritan jubilean gazeton.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

AŬSTRIO

— Fine de aprilo finiĝos kurso kun 30 partoprenantoj. Bonvolu sendi el ĉl., L, PK, por pruvi ke esp. estas disvastigita en la tuta mondo. Adr.: J. Zirngast, Burggasse 3, *Bruck a. M., Stmk.*

BRITIO

— Kiu vendos al mi n-on 1 (61), okt. 1928 de "La Nova Epoko"? Skribu al: K-do Burbey, 21 Gipton St. Roundhay Rd., *Leeds.*

GERMANIO

7 Gek-doj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Ni nepre resp. Adr.: K-do Erwin Becker, Ndf. 45, *Weigelsdorf/Eulengebirge.*

K-do Wilhelm Dobel, *Arnsdorf/Sa.,* kĉl, L, PK, PI.

— 6 Gek-doj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. garantiata. Adr.: Alfred Häntzschel, *Lichtenhain 15 F, b. Bad Schandau/Elbe.*

SOVETIO

— Grupo de int. lab. interligo de fervojistoj proponas seriozan koresp-adon kun eksterl. fervojistoj. Skribu al: Boriso Vdovenko, grupo Oktjabrska de Esperantistoj, Oktjabrskaja 26, *Moskvo-Lublino.*

TURKIO

Adresŝanĝo. — K-do J. Tabakov, gani bey köŝkü, Namazgah mahalesi, *Büyük Ĉamlica,* Konstantinoplo.

La plej norda esp.-klubo en la mondo

"Montlagopo" aranĝas letervesperon dum aprilo k majo. Ni atendas L, PK, PI ktp. el ĉ. landoj. Resp. garantiata. Bonvolu adresi: S-ro B. Oskarsson, Kv. 70, T. 8, *Kiruna* (Svedio). Skribu sur la koverton: "Por letervespero".

ATENTU!

50 komencantoj de esp-o dez. korespondi kun la tuta mondo pri div. temoj, L, PK, PI. — Adr.: K-do E. Zachte, Henrietta-Ronner-Str. 2, II, *Amsterdam (Z),* Nederlando.

ENHAVO

	pago
Okaze de la Unua de Majo . . .	241—42
Majo	242
Rezignu vian potencon!	242
La trompo pri rasa supereco . .	242—43
La klasbatalo tra la mondo . . .	243—44
Kiel pasis la Unuamaja Tago en Kievo	243—44
Kial senlaboreco?	244—45
Al nova Majo	245
Por nia medito	245
Tago el mia vivo	245—46
Tra Esperantio	246—48
Korespondado	248

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12